

FLANDRA UNUIĜO de KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F.U.K.E.

KATHOLIEKE VLAAMSCH ESPERANTO VEREENIGING K.V.E.V.

SEKCIO de I.K.U.E.

Sekr.: Oude Gantweg, 3, Brugge
Poŝtĉek.: Katholiek Vlaamsch Esperanto
Verbond, Aalst, n^r 4123.54

Jarkotizo FUKÉ : 7 fr.

Abono Espero Katolika : 35 fr.

Informilo n^o 3 (Julio 1934).

Provincaj delegitoj :

Antw.: E.Paesmans, Koepoortstr.64

Brab.: G.VanEylen, Brugstr.4. Park.Heverlee

Or.Fl.: L. Calloens, Aalst

Okc.Fl.: H.Braekevelt, Staĉiedreef, 177
Roeselare.

Limb.: Pastro A.Beckers, Groot Seminarie,
Luik.

Kunveno en Oostende: La rezulto de nia jarkunveno estas tre kontentiga. Pli ol 20 novaj membroj, kelkaj novaj abonoj al E.K., elekto de kasistino Fraŭlino P. De Cock, Aalst, de sekretario A. Roose, Brugge; mankos nur Prezidanto. Kiu? La Valona sekcio de I.K.U.E., laboras laŭ ekzemplo de FUKÉ.

Fino Simonis invitis nin al Katolika Kongreso en Den Bosch, ni kaptu la okazon kaj multnombre partoprenu !

Ni decidis paroli en la radio pri FUKÉ, eldoni propagandan libreton flandra-lingvan.

Ni provos teni dum la grandaj ferioj provincajn kunvenojn kien ni invitos la geekleziulojn, la katolikajn sociajn laborantojn. La kotizo de F.U.K.E. estas fiksita je 7 Fr. por permesi daŭran eldonadon de nia informilo kaj eblu ĝin pliampleksigi.

Nia jankunveno okazos proksiman jaron en Bruselo.

+++++

Jarlibro de I.K.U.E. estis laste eldonita en 1931/1932 kaj verŝajne denove en 1934 aŭ 1935; niaj membroj ĝin ricevos. Ni klopodu ke nia lando estu bone reprezentata kaj vi kiu ĝis nun ne ricevis la membrokarton de FUKÉ bonvolu tuj pagi la 7 fr. al poŝtĉekkonto n^o 4123.54

+++++

Preĝaretoj: luksa eldono de P.Ramboux, 6 Fr.; de Carolfi, 6 fr.; Spirita Juvelaro (bonega teksto) 15 fr. pagendaj al poŝtĉeko n^o 4123.54
Ankaŭ katolikaj insignoj po 5 fr.

+++++

Ĉiu membro jam ricevis la regularon de FUKÉ kaj per tio propagandu ĉe la Katolikaj ne-membroj, ekleziuloj, kat. Instruistoj, skoltoj, laboristoj, k.t.p.

+++++ Bonvolu sendi artikolojn pri la katolika vivo por E.K. al nia sekretario.

+++++ KONGRESO de Katolikaj Esperantistoj:

Niaj membroj estas kore invititaj al la Esperanto-kongreso en 's Hertogenbosch, la 15an, 16an kaj 17an de Aŭgusto, kie ni renkontos katolikajn samideanojn de diversaj landoj. La kotizo 20 belgajn frankojn oni pagu al poŝtĉekkonto n^o 4123.54 de KVEV. Unuaranga loĝado kun matenmanĝo kostas 40 fr. kaj malpli laŭplaĉe. Festeno 32 fr. Ekskurso aŭtobuse 12 fr. Mgr Diepen, episkopo, ĉeestos kaj faros la Diservon. Ankaŭ Pastro Font Giralt ĉeestos. Jam kelkaj FUKÉ-anoj ankaŭ promesis iri. Pagu tuj la kotizon kaj vi ricevos priajn detalojn.

+++++ Nia Antw. delegito ĉiam estas preta doni korespondan kurson al katolikaj interesuloj.